

I. F. E. A.



ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI

Aderente alla INTERNAZIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
 alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
 Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italia)



Informa Bulteno

ITALIA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071

REDAKTORO: Gimelli p. l. Germano

N° 5 - 6

Majo kaj Junio 1959

9-a Jaro

11-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO - KONGRESO EN LINZ

Unu semajnon antaŭ la malfermo de la kongreso, kiam ankoraŭ la L.K.K. kun siaj fidelaj ge-kunlaborintoj febre laboris en la Esperantejoj venie la unua kongresanino: el Sofio, ankaŭ la sekvajn tagejn alvenis unuopaj kongresanoj el diversaj landoj, i.a. geedzoj el Skotlando. Tie estis bona antaŭsigno per la kongreso. Vendredon, la antaŭtago de la oficiala akcepto, alvenis la I.F.E.F.-Estraro, la Germana Esperanto-Filmo-Asocio de Braunschweig per propra aŭtomobile kaj pluraj kongresanoj en Linz. Sabaton, la tago de la akcepto estis kiel kutime granda vigleco en la kongresejo. Ekde tre frue matene L.K.K.-anoj kun siaj helpantoj ornamigis la ejojn de la kongresejo, ĉar oni ne povis eklabori tie, la antaŭtagan vesperon pre balotkunveno. La stacidoma akceptservo bone funkciis, la tutan tagon trafikis aŭtobuse 2 mezgrandaj busej "Combi" kaj 2 personaŭtomobilej inter la stacidomo - Kongresejo - legejoj de la kongresanoj. Tiuj aŭtomobilej estis je nia dispone laŭ komisi de nia altŝatata prezidanto D-ro Kassecker.

La interkonatiĝvespero estis malfermata de nia kara estro Dipl. Ing. Tschern, je tiu okazo li prezentis al la kongresanoj, siajn kunlaborantojn: s-anojn Bürger, Angermayr, Ulrich, Geroldinger kaj Hellinger. La estro precipe substrekis la unikajn organiza laboradojn faritajn de siaj kunlaborantoj. Per la amuza atmosfero dum la interkonatiĝa vespero zorgis sramelerkestre kaj la fama esperantista aktoro Alex. Starke el Nürnberg, kiu rikoltis fertajn aplaŭdojn.

Dimanĉo, la tago de la selena malfermo de la kongreso okazis sub la signo de la baloto per nova registaro en Aŭstrio. Pro tio nia protekteranto trafikministro Dipl. Ing. Waldbrunner kaj aliaj eminentuloj, kiel politikaj deputitoj ne povis partopreni la malfermon de la kongreso, sed ankaŭ multaj Aŭstria (ne-linzaj) esperantistoj ne ĉeestis, ili kunlaboris en siaj hejmlokaj balotkomitatoj, aŭ aliaj preferis veĉdeni en sia logloko. Ankaŭ la gazetservo ne funkciis tiel bone, kiel oni promesis al ni antaŭe dum la gazetara konferenco, ekzistis inter la Aŭstroj balotfebre, sed tio ne tuis la eksterlandanojn. Tamen ni estis kontentaj.

Je la nua heru la granda festsalono plenigis kun fervojistaj gesperantistoj el tuta Eŭropo. La salonego estis simpla sed bele ornamita, sur la balustrado staris granda eblemo de I.F.E.F. (farita de ge-sanoj Bürger) kaj en la salono flanke estis fiksigitaj eblemoj de la gisnunaj I.F.E.F.-Kongresej, farita de dana s-cano Rasmussen. Tie faris kvazaŭ impreson pri la tradicio de nia internacia I.F.E.F.-movado. 45 muzikistoj de la linza fervojista orkestro donis la muzikan impulson al malfermo, post salutvortoj de la estro Dip. Ing. Tschern, sekvis nun la prezidanto

de la fervejo D-ro Leopold Kassecker, ĉi devis fari trioblan taskon, per la trafikministro Dipl. Ing. Waldbrunner, per la Ĝeneraldirektoro D-ro Schantl kaj en propra nomo kiel prezidanto de la linza ferveja direkcie saluti kaj malfermi la kongreson. Li bone majstris ĉien esperantlingve. Sed ankaŭ nia altsatata urbestro kaj liga konsilisto D-ro Koref salutis la kongresanojn esperantlingve (li estas lingvisto kaj scipevas 8 lingvojn).

La vice de sekvantaj parolantoj estis jenaj:

- 1) Salutado: Dipl. Ing. TSCHOM estro de la landa I.F.E.F.-sekcio Aŭstrio
- 2) Malfermo: D-ro Leopold KASSECKER en la nomo de la aŭstria lig-fervejoj
- 3) Salutado: Ligland-konsilisto Franz HARRINGER, anstataŭ la landestro per Super-Aŭstrio D-ro Heinrich GLEISSNER (Traduko de S-ano Mraz)
- 4) " : Liga konsilisto D-ro Ernst KOREF, urbestro de Linz
- 5) " : Oficeja konsilisto Helmut GERBERT per U.E.A.
- 6) " : S-ano Max HOLLINGER per S.A.T.
- 7) " : Efektiva Oficejkonsilisto Rajmund CECCH per Aŭstria Esperanto Feder.
- 8) " : S-ano Villy BRAENDSTRUP per Dana Fervejoj
- 9) " : S-ano Germano GIMELLI per Depelavere Ferroviarie Italia
- 10) " : S-ano J.J. LABORDUS per Entrepreno Van Gend en Lees, Nederlando
- 11) " : S-ano Hjalmar OLSSON per tri svedaj fervejistaj unuigoj, Stockholmo
- 12) " : S-ano Rune PALMGREN per sveda fervejista sindikato, Stockholmo
- 13) " : S-ano Oskar KOVACIC per aŭstra fervejista sindikato, Vieno
- 14) Delegitoj de la landaj I.F.E.F.-Sekcioj:

<u>Belgio</u>	: S-ano Leon DE BRUYNE	<u>Hungario</u>	: S-ano D-ro S. BACSKAI
<u>Bulgario</u>	: S-ano GAVRILOV	<u>Italio</u>	: S-ano Giulio CATENA
<u>Britio</u>	: S-ano Thomas SCOTT	<u>Jugoslavio</u>	: S-ano Gradimir MACIC
<u>Danlando</u>	: S-ano Peder Chr. PEDERSEN	<u>Nederlando</u>	: S-ano W. HOOGENDIJK
<u>Finnlando</u>	: S-ano Brune KOIVULA	<u>Norvegio</u>	: S-ano E.A. RYGGE
<u>Francio</u>	: S-ano G. LEMONNIER	<u>Svedio</u>	: S-ano Erik OLSSON
<u>Germanio</u>	: S-ano Joachim GIESSNER	<u>Svisio</u>	: S-ano Kurt GREUTERT
<u>Hispanio</u>	: S-ano J. SALADRIGAS	<u>Aŭstrio</u>	: S-ano Hans BURGER

- 15) S-ano G. J. de JONG, Prezidanto de la I.F.E.F. Amsterdam
- 16) S-ano Kertega Konsilisto Hugo STEINER, Vieno - FESTPAROLADO.

Pesttagmeze okazis komuna fotografado ĉe la stacidomo kaj komuna aŭtebusa urbrendveturado kaj branveturado al sur Pestlingberg.

Dum la sekvantaj tagoj ĉi kongresejo aspektis kvazaŭ abelujo, ĉiuj aranĝoj okazis en la sama domo, ĉar estis multaj ejoj je nia dispeno, estis apartaj ejoj per akcepto-kasoj-legafero-pestkongresa akceptejoj (okupata de pestkongreskomitato) ejoj per mensaĝoj, aparta poŝtoficujo (okupata de poŝtoficisto S-ano Reichenberger), vendejo per vidajkartoj kaj aliaj memoraĵoj (okupata de nia vigla S-ano Brune Lachmaier el Voeklabruck), vendejoj per diskoj esperantlingvaj (okupataj de ges-anoj Biernath kaj Peterkau kaj tiel familianoj), ejo per ekspoziciejoj unue de infandeseĝoj el diversaj landoj aranĝita de S-anoj Giovanal (Lyon) kaj Burger (Linz). En la spegula salono seninterrompe okazis labor- kaj fakkunsidej kun gravaj decidoj. Unu de la gravaj decidoj estis, ke nia alttestimata I.F.E.F.-sekretario Jan Lek (Amsterdam) decidis, okaze la nevekto de la IFEF-Estraro denove resti unu jaro kiel sekretario, ĝojige estas ankaŭ, ke nia neŝacema IFEF-Pienciro Lek ricevis de nederlanda reĝino Juliana argentan ordenon per merito per Esperanto, ĉiuj elkore gratulis al ĉi pro tiu ĉi honorigo. En fakprelegejo estis bone vizitataj malgraŭ ĉi interesaj paroladoj: S-ano Bürger parolis pri la evoluo de la internacia heraro kaj S-ano Ulrich parolis kaj montris per siaj memfaritaj belaj kolordiapositivej la signalojn ĉe la aŭstria fervejoj (Granda aplaŭdo).

La plej granda parte de la kongresanoj tag-kaj vespermanĝis en la kongreseja restoracio. (Ĉar la fervoja kantino ne povis akcepti per manĝi tion da homoj, tie nur manĝis limigita parte de kongresanoj el la orientaj landoj. Tielmaniere laŭsajne estis ĉiuj kontentaj.

Ankaŭ la ekskurse-pregrame de s-ano Geroldinger bone funkciis, seninterrompe ferveturis kaj revenis aŭtobusoj ekzakte laŭ programej. Ĉar Linz estas urbo de industrio, la plej multaj ekskursej estis direktataj al ties granduzinoj kiel VÖST. ktp. La virinoj preferis vidi la plej modernajn infangardenojn kaj lernejojn de Linz. Do, ankaŭ la ekskursej al la ekster Linz situante 2 famaj Barokmanufakturejoj St. Florian kaj Wilhering estis bone frekventataj. Ankaŭ la bela vetero helpis al ni pli agrablighi la ĉiutagajn ekskursejn.

Tre geĝigantaj estis niaj vesperaj aranĝoj al niaj kongresanoj, sed ne nur por la kongresanoj aŭ Lkk-anoj sed ankaŭ al la ge-akteroj mem, ĉar ili vere geĝis pri tion da aplaŭdoj. Lunde dum la kulturvespero, prezentata de muzikerkestro de "Sepp Froschauer" Linz kaj la tre satata soprano Liselette Wellner (Linz-anino) nuntempe en la urba teatro St. Pölten) prezentis veran aŭstran operet-vesperon. Post kelkaj tagoj, kiam ŝi hazarde renkontis kelkajn linzajn samideanojn, ŝi esprimis sian entuziasmon pri la esperantista publiko kaj promesis al ili, baldaŭ viziti nian E-klubejon kaj se ŝi iam denove konstante loĝos en Linz, ŝi pli ofte vizitos nian Esperantan Hejmon. per eble lerni Esperanton.

Marde, posttagmeze okazis i.a. nur per delegitoj speciala akcepto kun gastigo ĉe bufede en la granda salono de la fervoja administracio Linz. Krom la gastiĝanto Prezidanto D-ro KASSECKER ĉeestis la plej gravaj altranguloj de tiu direkcio, de, pri faritaj impresoj la delegitoj mem velas raportoj

La inernacia bale estis malfermata de bona baleto de la dancinstituto D-ro Hen (el tiu instituto jam kelkaj majstropareoj gajnis dum inter. konkursoj belajn premiojn) kaj per rekeka dance de la 6 kaj 7 jaraj infanoj de ge-sanoj Geroldinger estis kompreneble, ke per tiaj pareoj, la dancemaj ge-kongresanoj estis ekflamigitaj. Post la Donaŭ-valze sekvis modernaj danceoj. (ĉanemuzikerkestro de la fervojista orkestro) dum en apuda salono koncertis framelkverteto. Oni danci kaj kantis, bedrinde la granda gajejo devis finiĝi je la 24 h. Do, la plej petolemuoj poste grupe iris al diversaj noktaj amuzejoj de Linz.

Merkreden vespere montris la Filmisto s-ano Petelklaus de la GERMANA ESPERANTO-FILMO-ASOCIO esperantlingvajn sonfilmojn pri la pasintaj UEA-Kongresoj en Marseille kaj Mainz kaj pri la bela Harz-regiono. Ni devas respektive taksu tiun ĉi filmlaboren de niaj samprofesuloj, kiuj estas kuragaj produkti la unuajn esperantlingvajn sonfilmojn kaj ni nur povas rekomendi al ĉiuj E-grupoj pruntepreni tiujn filmojn per iliaj E-aranĝoj. La Radio-stacio Zagreb sendis raportanton, li akceptis per sia magnetafono la plej gravajn partojn el nia kongreso per Radio Zagreb.

Jaŭde-matene je la 8 h la kongresanoj forlasis linz per ekstra trajno. La trajno konsistis el lokomotivo, kiu estis sur la fronte ornamita per la granda eblemo de la I.F.E.F. (kiu vekis la atentecon survoje en multaj stacidomejoj ĉe la deĵerantaj fervojistoj kaj la loĝantoj de diversaj lokoj), 7 modernaj vagonoj i.a. danvagono, ĉiuj instaligitaj kun laŭtpareloj, la traveturita linio estas 350 km longa. La trajnestro estis s-ano Albert Schönlbauer kaj la akompanata kontrolero s-ano Weiler.

Dum pluvema vetero ni traveturis la urbejn Enns-St. Valentin direkte Steyr, la malnova fer-urbo la 2. pli granda urbo de Super-Aŭstrio (40.000 enloĝantoj). Post 15 min haltado la trajno traveturis la iam sovaĝan montriveron Enns, kien nun dum la lastaj jaroj estiĝis 4 artefaritaj lagetoj kun 4 elektraj uzinoj. Pluraj El-uzinoj estas projektataj, entute 13, kiuj liveros 320.000 Kv. la plej malvasta parte de tiu ĉi vale nomigas "Gesäuse" ĉar tie inter la gigantaj montoj la rivero trafluante faras grandan bruon.

Sed ni ankaŭ ne devas forgesi, esprimi la sinceran dankon al niaj fidelaj kunlaborantoj dum la kongreso, precipe al linzaj ne-vervejistaj ge-sanoj lerneja direktoro MRAZ, Bruno LACHMAYER kaj Franziska ENSBERGER (Vecklabruck) gefratoj GOSSL, f-ino Eva GASSELSIEDER, TISCHLER kaj RAMETSTEINER, al niaj fakgrupanoj, s-anino Otti BURGER, f-ino Gisela KURNER, ge-sanoj TEUFELSBRUCHER, GRAML, WAGNER, WIESHOFER, KRIECHBAUMER, Franz HUBER, s-anino GEROLDINGER, Franz GIERLINGER, Franz SENK, Franz WIRTL, Stanif kaj Max SASSMANN.

La postkongresa komitato sub gvido de nia honorprezidanto k.k. Hugo STEINER kun siaj kunlaborantoj s-anoj Ing. EICHINGER, Josef ZINK, Ing. HERMANN, Ing. HUBER kaj Josef HAWLA en Vieno havis multajn malfacilaĵojn pro la loĝizeco en Vieno, ne estis facile trovi kontentigajn solvojn, pro la P.K.L.K. Vieno funkciis sen interrompe jam dum la kongreso en Linz, ĉe en ekstra trajno kaj sur la ŝipe. Ĉe alveno en Vieno la Prezidanto de la A.E.F. s-ano CECH atendis kun 20 vienaj ge-sanoj la gastojn. Aliajn tagojn la postkongresanoj kolektis antaŭ la Urbdomo, kie ili estis afable akceptata de la Urbestro Franz JONAS (kun edzino, ambaŭ estas malnovaj geesperantistoj) Vicurbestro HONAY (li antaŭ kelkaj tagoj subite mortis) kaj la fervejista sindikatestro nacia-konsilisto Richard FREUND. S-ano JONAS esprimis sian deziron, ke denove okazu la I.F.E.F.-Kongreso en Aŭstrio kaj nome en WIEN. Post kera adiaŭo de nia urbestro Jonas, la delegitoj sub la gvido de sindikatestro Freund estis akceptataj de la Ĝenerala Direktoro D-ro SCHANTL en la ĝenerala direkcie de la Ŭ.B.B. Poste daŭrigis aŭtobusa karavano si an rondveturado laŭ programo tra kaj ĉirkaŭ Wien.

La 12-a I.F.E.F.-Kongreso okazos en Junio	1960 en HELSINKI (Finnlando)
La 13-a I.F.E.F.-Kongreso okazos en Majo	1961 en BARCELONA (Hispanio)
La 14-a I.F.E.F.-Kongreso okazos en Majo	1962 en BUDAPEST (Hungario)
La 15-a I.F.E.F.-Kongreso okazos en Majo	1963 en BRUSELO (Belgio)

La sekretario de la I.F.E.F. - Sekcio Aŭstrio : L. ANGERMAYR

LA ĜENERALA SEKRETARIO DE I.F.E.F. - HONORIGITA

Je la 30-a de aprilo S-ino Regina Meŝte de Nederlando honoris nian Ĝeneralan sekretarion Jan LOK per arĝenta medalo en la "Orde van Oranje Nassau". Li ricevis tiun gravan distingilon pro sia fidele servado dum 40 jaroj de la fervejo, kaj pro la grava labore kiu li faris per la Esperanto-Movado.

Ni jam de longe konas Jan Lok. Ni scias kiel fervore kaj entuziasme li donas siajn fortojn kaj liberan tempon al la disvastigado de Esperanto inter la kolegare. Tial ni ŝojas pro lia honorigo, kaj esperas ke li ankoraŭ dum multaj jaroj povos doni siajn fortojn al la Esperanto-Movado.

D I S T I N G I T O

La fondinto-direktoro de la Internacia Esperanto Muzeo en Wien, S-ano Heirat Hugo STEINER estis distingata per la meritkruco de unua klase de la meritordeno de la Germana Federacia Respubliko. La estraro de I.F.E.F. samideame gratulas.

INTERNACIAJ ESPERANTISTAJ ARANĜOJ

25/7 - 1/8: Internacia E-feriekurso en Helsingo: Infirmas L. Friis, Ingermans-wj 9, AABYHOJ (Danlando)

Julio - Aŭgusto: "Lernu france per Esperanto" en kastelo GREESILLON, BAUGE

1/8 - 8/8: 44-a UNIVERSALA-KONGRESO DE ESPERANTO en Varsovio (Pollando)

1/8 - 7/8: Internacia Kongreso de S.A.T. en Dortmund (Germanio)

9/8 - 15/8: Naturamika Esperanto-Periosemajno en EBENSEE (Supra Aŭstrio)

16/8 - 22/8: Internacia renkontiĝo de esperantistaj naturamikej en Wien.

DEZIRAS KORESPONDI

-BERCZYNSKI Józef - Str. Gaiazdowska 8 WARSZAWA 24 (Pollando)

-GABRIELO VAD - Kárász 6 SZEGED (Hungario)

-ČERVONKA Stanislav - BZIERZAZNO-I pov. KARTUZY (Pollando)

Firenze kun sia Arme argenta, kies akvoj fluantaj reohigas la amajn sepirejn de Dan-
eo, kun siaj krenelitaj turoj kaj elegantaj kampaniloj, kun la mildaj Madonoj de Beate
Angelico kaj la Kristoj de Donatello alvekas vin. Gi alvekas vin tra la harmonia rondo
de siaj ĉarmaj mentetoj, de vinberujoj kaj olivarboj. Rava urbo, patruje de grandegaj
potoj kaj artistoj, riĉa je nekomparebla historio, Firenze kunigas en si la severan
grandecan de la Mezepoko kun la serenceco de la Renesanco. De la XII-a ĝis la XV-a jar-
cento, de Dante al Machiavelli, de Giotto al Brunelleschi kaj Michelangelo, Firenze
estis la plej viva fajrero de la italaj penso kaj arte, kaj fermis unu el la plej al-
taj idealejoj homaj de civilizaceo kaj beŭteco.

Fondita de la Etruskoj preksimume en la V-a jarcento antaŭ Kristo, poste roma kole-
nio, ĝi ekakiris gravecon post la jaro mil, prosperis mirinde pro plivastigo de la ko-
merceo kaj pro la florado de la industriejo: la venkaj luktoj per la supereco en Teska-
nie pligrandigis ĝian pli ĝian potenceon. Sian universalan ĉarmen ĝi ŝufidas al la glo-
ra historio de sia komunuma ekzistado. De la unua duono de la XV-a jarcento sub la
regado de la familio Medici la prospero de Firenze atingis sian plej belan brileon.
Lorenzo il Magnifico vigle personigis la figuren de prince, ŝtatisto, kaj mecenato,
kaj sub ĝia regado la artoj floris en Firenze signante la plej grandan epecon de la
homa spirito. Dum tiu tempo oni konstruis la plej famajn monumentojn: lingvo, arte,
literature, havis sian plej altan esprimon.

La Granda Duklando de Toskanio, kreita de Medici en la XVI-a jarcento pasis en la
XVIII-a al la hereda familio, kiu forlasis la urbon (okazas ĝuste la centjara datre-
veno) en la jaro 1859. Dum mallonga periodo, de 1865 ĝis 1871, Firenze estis la ĉef-
urbo de la nova unuigita ŝtato Italuje.

Ankaŭ dum nia jarcento ĝi estas je la avangardo de la kultura kaj arta movado: aka-
demioj, lernejoj, altkulturaj institucioj donas al studentoj senfinajn fontojn de
scio kaj plezure.

Firenze atendas vin. La kupolegoj, S. Lorenzo, S. Spirito, palaco Pitti, la logioj
de l'Innocenti, la kapelo Pazzi, diras al vi la saluton de Brunelleschi. Salutas vin
Arnolfo per Palazzo Vecchio, Giotto per la kampanilo, Ghiberti per siaj Pordejoj de la
Paradizo. Jen la Perseo de Cellini, la David kaj la Pietà de Michelangelo, jen Miche-
lazzo, Benedetto da Maiano, Giuliano da Sangallo, jen Botticelli, il Ghirlandajo, An-
drea del Sarto, Masaccio. Jen la cent kaj cent ĉefverkoj kiuj ornatas preĝejojn, me-
nakejojn, palacojn, konatajn en ĉa tuta mondo. Sed Firenze alvekas vin ne nur per la
gloro de la pasinteco, per la gravaj muzeoj kaj riĉegaj galerioj, sed ankaŭ invitas
vin al siaj sugestaj promenejoj, al siaj mirindaj ĝardenoj kaj ombriĉaj parkoj, al
siaj pentrindaj ĉirkaŭaĵoj, al la allogaj spektakloj kaj amuzajoj, al la modernaj
stratejoj, artaj magazenoj, luksaj oteloj, famkonataj restoracioj, kiuj altiras tutmen-
dan homamason.

Bonvenon al vi, samideanoj! Supreniru al Fiesole, supreniru al la Piazzale Miche-
langiolo: jen estas sub via rigardo kaj tute ĉirkaŭe vastiĝas rave la panoramo de la
urbo, de l'altaĵoj, kaj de la Arnovalo.

(el "l'Esperanto" n° 57)

C. G.

PARTOPRENU LA ITALAN KONGRESON ! - HELPU LA LABORON DE LA ORGANIZA KOMITATO !
SENDU TUJ VIAN ALIGON ! Sekretariejo de la 30-a Itala Kongreso de Esperanto,
Via Pagnini 18 - Firenze 4 (Italuje)...

ESPERANTO STANDO EN LA FOIRO DE PARIZO

Kiel ĉiujare ankaŭ dum printempa Foire de Parizo, Esperanto havis sian propran
standon en la Foire.

2-a INTERNACIA KONGRESO DE LA POPOLAJLERNEJOJ EN FIRENZE - havis kiel solan kongres-
lingvon Esperanton.

PENSIONO RESTORACIO "ESPERANTO" en Cervia Milane Marittima Viale dei Mille, 70 (Italio)
petu Esperanlingva prespekto kun prezoj kaj kondiĉoj.

ESPERANTO EN LA RADIO

POLA RADIO - Esperantaj disaŭdigoj - Varsovio (Pollando)

Dissendas ĉiutage duonhoran programon en Esperanto, de la hore 16,30 ĝis la hore 17 (M.E.T.) per mallongaj endoj de metroj: 25,20 - 25,29 - 30,98 - 31,45 - 31,50 - 41,12 kaj per meza endo de metroj 249 (1205 kes).

Sabate kaj dimanĉe specialaj eroj de la programo ni dediĉas al la esperantaj problemoj. Neme: Sabate ni disaŭdigas la senrevuen "La semajno en Pollando" kaj infermojn de la L.K.K. en la "Voĉo de la 44-a U.K."; dimanĉe la krenikon de la Esperanto-movado "Sub la Verda Stelo".

RADIO SOFIA - Esperantaj disaŭdigoj - Sofia (Bulgarie)

Ĉiudimanĉe Radio Sofia disaŭdigas en Esperanto de la 19-ĝis 19,25 hore Grinviĉa tempo (20 ĝis 20,25 laŭ M.E.T.) per endoj: 39,11 metroj = 7670 kilocikloj kaj 41,35 metroj = 7255 kilocikloj. La disaŭdigo estas ripetata la saman tagon de 22,30 ĝis 22,55 hore Grinviĉa tempo (23,30 ĝis 23,55 laŭ M.E.T.) per endoj: 39,11 metroj = 7670 kilocikloj kaj 49,42 metroj = 6070 kilocikloj.

RADIO ROMA - ESPERANTO FAKO - Casella Postale 320 Roma (Italia)

Dissendoj en Esperanto - Jaro 1959

La dissendoj okazas de h. 18,55 ĝis h. 19,10 (M.E.T.). Ondlongoj: metroj 30,90 = Me/s. 9,74; metroj 41,24 = Me/s. 7,27 kaj metroj 50,34 = Me/s. 5,96.

Prelegantoj; mardo: alterne S-ro L. MINNAJA kaj Prof. D-ro V. MUSELLA
merkredo: S-ro Luigi MINNAJA kaj vendredo: Prof. D-ro Vincenzo MUSELLA

J U L I O 1 9 5 9 - a

- 1085 merkredon la 1-an: Kuriero de Esperanto
- 1086 vendredon la 3-an: La vizaĝo de Jesuo en la italaj pentraĵoj
- 1087 mardon la 7-an: Tra la literaturo
- 1088 merkredon la 8-an: Kuriero de Esperanto
- 1089 vendredon la 10-an: Novaĵoj el Italujo
- 1090 mardon la 14-an: Leterkesto kaj bibliografio
- 1091 merkredon la 15-an: Kuriero de Esperanto
- 1092 vendredon la 17-an: Historio de la muzikinstrumentoj: itala origino de la violono
- 1093 mardon la 21-an: Italaj kanzenoj en Esperanto
- 1094 merkredon la 22-an: Kuriero de Esperanto
- 1095 vendredon la 24-an: Italujo kaj frendaj verkistoj: Cervantes
- 1096 mardon la 28-an: Italujo kaj la sociaj demandoj: la turismo
- 1097 merkredon la 29-an: Kuriero de Esperanto
- 1098 vendredon la 31-an: La tria jarcento de la itala literaturo (la 15-a jarcento)

A U G U S T O 1 9 5 9 - a

- 1099 mardon la 4-an: Tra la literaturo
- 1100 merkredon la 5-an: Kuriero de Esperanto
- 1101 vendredon la 7-an: Grandaj Sanktuloj: Sankta Dominiko
- 1102 mardon la 11-an: Novaĵoj el Italujo
- 1103 merkredon la 12-an: Kuriero de Esperanto
- 1104 vendredon la 14-an: Italujo kaj la sociaj demandoj: la ferioj
- 1105 mardon la 18-an: Italaj kanzenoj en Esperanto
- 1106 merkredon la 19-an: Kuriero de Esperanto
- 1107 vendredon la 21-an: Leterkesto kaj bibliografio
- 1108 mardon la 25-an: Tri ĉarmaj restadejoj: Analfi, Ravello, Positano
- 1109 merkredon la 26-an: Kuriero de Esperanto
- 1110 vendredon la 28-an: La kvara jarcento de la itala literaturo (la 16-a Jaro.)

La Faktestro: Luigi MINNAJA

ANONCO EL AŬSTRALIO

Per varbi nevajaj membrojn kaj kursanojn per la venonta kurso, niaj amikoj en Aŭstralio aranĝes dum aŭguste ekspozicion. La Aŭstralia I.F.E.F.-Sekele konsistas nur el 15 membroj, sekve ĝi nepre bezonas nian helpon, por ke la ekspozicio estu allaga kaj celtrafa. Helpu ankaŭ en alia kontinento plifertigi nian I.F.E.F.-movadon. Sendu de senprekraste bete afrankitaj bildkartoĵoj, esperantajoĵoj, k.t.p. al ĉi suba adreso. Rekompence vi ricevos bildon de vidindaĵoj el la urbo Melbourne.

Adresu al: Esperanto-grupo, Railways Institute, MELBURNE (Aŭstralio).

TUTMONDA GAZETARA EKSPOZICIO (15 ĝis 31 septembro)

Per altiri la atenton de la hispana ĵurnalistaro al nia lingvo kaj al la Esperanto-movado, la Esperantista Klubo "Nerde" de Educacion y Desacaso, Oviedo, Hispanio, Str. San Juan 10, decidis aranĝi tutmondan ekspozicion de ĵurnaloj, gazetoj, revuoj k.t.p. en naciaj lingvoj, kaj ankaŭ en Esperanto. Ni intencas prezenti pli imponan kiel-eble amason de periodaj publikigaĵoj, kie elmentros la taŭgecon de nia lingvo per internaciaj rilatoj.

Tium aranĝon patronecas la Provinca Sindikatestro, kaj ni esperas ke la hispana Ministro de Nacia Edukado kaj la Generala Direktoro de Hispana Gazetaro akceptos Honoran Patronadon.

Nia celo malsukcesos se vi, ĝesperantistoj, ne helpas nin sendante ĉiaspecajn ĵurnalojn, revuojn, gazetojn; porviraĵajn kaj perinfanajn periodajn publikigaĵojn k.s. en via nacia lingvo. En la ekspoziciejo ni starigos apartan Esperantan standon.

Ni esperas ke vi sendos al ni plej multan materialon per nia ekspozicie kaj restus al vi tre dankaj se vi disponigus nian planon al viaj ĝeamikoj esperantistaj aŭ neesperantistaj, kaj al la ĵurnalistoj de via urbo.

Ni estas pretaj pagi la afrankon de la sendaĵoj kaj resendĵi ĉi tiujn post la prezentado, se tion vi deziras. Ni kvitancoas ĉiun sendaĵon per bela ilustrita poŝtkarto. Mi ne dubas pri via helpe kaj pro tio mi antaŭdankas vin.

Luis Garcia Fernandez, Prezidante